

Ateismo

Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo





http://www.gazetoteko.com/ateo/

Nº 15 *Oktobron de 2012*

Vorto de la prezidanto

Mi bedaŭrinde ne partoprenis la ĉi-jaran UK-on en Hanojo, do mia "Vorto" estos nur "Vorteto", des pli ke evidente por plenigi la ceteron de la bulteno, alvenis sufiĉe multnombraj kontribuoj, responde al la debato-temo proponita de Anna. Krome, pro manko de spaco en la lasta numero, mi konservis plurpaĝan artikolon de Pier Luigi Cinquantini, plus tradukon de Jeanine Dumoulin.

Atentu ke foje iuj artikoloj estas tiel redaktitaj ke ili implice instigas al debato. Ĝuste Martine Rivière respondas al la demandoj de Michel Ahado en la 14^{a} numero.

Fine, ni adresas dankojn al Fabiano Corsetti kaj Manuel Giorgini pro la sendo de ilustraĵoj.

Post prezento de la kongresa temo fare de Anna, sinsekvas la kontribuoj al la debato, sendepende ĉu la sendinto kongresis aŭ ne.

Bonan legadon.

Christian Rivière

ATHEIST ALLIANCE INTERNATIONAL

FOR A SECULAR WORLD

Por mondo sekulara

http://www.atheistalliance.org/index.php

Pasintan jaron, mi renkontis la vic-prezidanton de ATEO (Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo). Li petis de mi ke mi skribu ion por lia ĵurnalo. Vidi mian kontribuon en Esperanto estos tute nova por mi : tio decidigis min sciigi mian opinion.

Sekve de nia aperigo de ŝia kontribuo en la 14^{a} numero de nia bulteno S-ino Tanya Smith aperigis sur la retejo de « Atheist alliance International », la 9^{an} de majo 2012, sub la titolo « My words en Esperanto » (« Miaj vortoj en Esperanto »), skanaĵon de la koncernata paĝo en Esperanto kaj la anglalingvan version kun la ĉi-supra prezento.

Ŝin ni kore salutas, gratulas kaj dankas.



Malaltigo de la kotizoj por 2013 !

Jam proksimiĝas la fino de la jaro. La postan numeron vi ricevos printempe, do mi nepre rememorigu ke en januaro komenciĝas la sezono de la (re)membriĝo.

Post ekzameno de la kaso-stato kaj de la nombro de membroj, ni opinias ke venas momento proponi malaltigon de la kotizo.

Por la jaro 2013 do, ĝi kostos :

10 eŭrojn por A-landoj
8 eŭrojn por B-landoj

Kongresa temo :

ĈU LIBERA MERKATO POR KREDOJ ?

Raporto pri la kongreskunveno

Ĉu ŝtato nepre devas toleri entrudiĝon de fremdaj idearo kaj kulturo en la formo de religia misia agado ? Tiun temon diskutis trideko da interesatoj dum la kunveno de ATEO ĉe la Universala Kongreso en Hanojo. Partoprenantoj prezentis la situacion en Ĉinujo, Japanujo, Israelo kaj Usono, kaj oni ankaŭ laŭtlegis

plurajn skribajn kontribuojn de neĉeestantaj membroj, interalie de Ralph Dumain, la fondinto de ATEO.

Libera merkato estas merkato sen eksteraj reguloj kaj kontroloj, kie komercistoj rajtas sen malhelpoj proponi siajn varojn, indiferente ĉu tiuj varoj estas utilaj por la socio. En la plejmulto da landoj ekzistas "libera merkato" ankaŭ rilate al religioj : iu ajn eksterulo rajtas viziti la landon por prezenti tie siajn religiajn kredojn kaj laŭeble konvinki la lokulojn pri ilia praveco.

En Koreujo, lando kun propra jarmila religia tradicio, pro vigla agado fare de kristanaj misiistoj ekde la 18[a] jarcento, nuntempe preskaŭ 30% de la loĝantaro estas kristanoj. Kontraste kun Koreujo, iuj ŝtatoj ne permesas tion : multaj islamaj ŝtatoj, sed ankaŭ Israelo kaj Ĉinujo. Tiu malpermeso estas ofte kritikata (precipe de tiuj, kiuj vidas sin elŝlositaj el alloga potenciala merkato !), ĉar tio kontraŭas la modernajn principojn pri libera parolrajto kaj religia libereco.

La demando estas, ĉu estas permesinde, ke misiistoj varbu por siaj kredoj en landoj, kiuj havas tute alian religian tradicion : ekzemple, ĉu estas akcepteble, ke kristanaj aŭ islamaj misiistoj varbu en aziaj landoj. Kaj se tio okazas, ĉu estas akcepteble, se tiuj landoj eventuale provu protekti sin per malpermeso kontraŭ tia misia agado?

Krom tradiciaj religioj, ekzistas multaj dubindaj sektoj, ekzemple Scientologio kaj simile. Ĉu nome de la libera parolrajto oni nepre permesu al homoj disvastigi infomojn, kiuj klare estas mensogaj ?

Tiu demando povus ankaŭ vastiĝi al demando pri la rajto de gepatroj transdoni siajn opiniojn al siaj infanoj. Precipe en Usono okazas, ke iuj gepatroj mem edukas siajn gefilojn hejme por instrui al ili kontraŭsciencajn kredojn, kiuj neas ekzemple la sciencajn faktojn pri la aĝo de nia Tero kaj pri evoluado de specioj. Ni memoru, tamen, ke sen la rajto je libera parolado verŝajne en multaj landoj ateistoj ne rajtus prezenti siajn opiniojn. Do, la demando efektive havas du flankojn, kaj povus esti opinioj por kaj kontraŭ.

Dum la kunveno en Hanojo, ni evidente ne povis proponi simplan solvon al tiel malsimpla problemo. Eblis nur prezenti la argumentojn por posta pripensado.

Anna Löwenstein (Italujo)

Viaj opinioj

Saluton, Esperantistoj ! Vekiĝas en mi stranga sento pri kunveno en Vjetnamio : la vorto mem incitas dolorajn memorojn pri tiu horora milito kiu ruinigis ne nur Vjetnamion

sed ankaŭ la politikan kaj ekonomian ordon de Usono.

Nu, kiam mi kunfondis ATEOn en 1987, motivis min la aktuala politika situacio en Usono en kombino kun impeto fari ion praktikan per Esperanto en la jubilea jaro. Kaj kiam mi pripensas la hodiaŭan temon de ĉi tiu kunveno, mi pensas pri la ideologio kaj realo de la tiel nomata "libera merkato" en mia lando. La ideologio de individuismo ebligas plurajn interpretojn kaj tiel servas malsamajn sociajn celojn. La usona situacio, kie oni fanfaronas pri libereco kaj obskurigas la potencrilatojn de la realo, plej ekzempligas la problemon. (Oni ankaŭ atentu la specialajn usonajn signifojn de ŝlosilvortoj : "liberty" funkcias malsame ol "freedom" ; kaj "liberty" estas ankaŭ dekstrula kodvorto.) La idealo de libereco estas unu afero, sed la ideologia iluzio de libereco fakte servas al diktatoreco kaj servuteco. Do inteligenta diskuto necesigas konscion de la kontraŭdiraj funkcioj de tiu koncepto.

La liberala idealo de individuaj rajtoj, kiu iam estis ilo de progresemuloj, estas ŝtelita de reakciaj teokrataj banditoj kiuj subfosas racian medicinon kaj publikan edukadon en Usono, uzante la ŝtaton por kontraŭi la racian funkciadon de la ŝtato, kaj per ŝtato rajtigi la arbitrajn decidojn kaj instruojn de frenezaj religiaj dekstruloj defie al komuna sekulara sociorda normigo.

Do kia estas la libereco en praktiko, kaj preter tio, en kio kuŝas la vojo al homa emancipiĝo en diversaj sociaj kuntekstoj ? Kaj ĉu iu ŝtato rajtas ekskludi religiajn organizojn, speciale kaze de importo aŭ invado de alia lando ?

Jen ĝeneralaj konsideroj pripensindaj en via diskuto.

(1) Kia estas la karaktero de la koncerna ŝtato ? Kia ĝia ĝenerala orientiĝo pri homaj rajtoj ?

(2) Kia estas la karaktero de la eniranta religio ? Pli bona demando, eble senrilata, sed pli prioritata : kia estas la organiza kaj homrilata karaktero kaj politiko de la "invadanta" religio, t.e. religia organizo ? Ĉu temas pri centrisma, hierarkia strukturo, kiel la Katolika Eklezio, ĉu pri pluraj privataj entreprenemaj aŭ diversideologiaj instancoj de sama religio, kiel diversaj Protestantaj kristanaj ordenoj, ĉu pri despotismaj kultoj ? Ĉu la organiza strukturo de la religio praktike estas distingebla de la doktrina sistemo de la religio ? Ĉu la praktikoj pravigitaj de religia doktrino estas tolereblaj, aŭ ĉu ili nepermesinde kontraŭdiras la aktualajn konceptojn, praktikojn, kaj leĝajn kriteriojn de homaj rajtoj ?

(3) Se kaj la invadanta religia instanco kaj la koncerna ŝtato estas reakciaj ekskludemaj aferoj, ĉu oni povas dece subteni unu partion aŭ la

kontraŭan ? Ĉu oni malfavoru nur, aŭ almenaŭ prioritate, la malstabiligan partion ?

(4) Ĉu la individua homo, sendepende de ordonema organizo, libere rajtas esprimi kaj praktiki sian kredon laŭ principo de libereco de konscienco, aŭ ĉu estas limoj, ekz. pri pritrakto de inoj aŭ infanoj ?

En Usono, historie, la libermerkata ideologio estis uzata por rajtigo de libereco de esprimado, eldonado, ktp., kontraŭ cenzuro kaj enkarcerigo, t.e. laŭ la principo de la neŭtraleco kaj senbrido de la kapitalisma merkato. Sed estas aliaj konceptoj de liberrajto ; cetere, en praktiko, pura libera merkato ne ekzistas ; la reala situacio estas manipulata, tendenca, monopolema merkato, kaj eĉ pluralisma ideologio povas kaŝi la realon.

Do diskutu.

Ralph Dumain (Usono)

-=-=-=-=-=-=-=

Tiu kunveno multe interesis min, eĉ se estis tro da intervenoj. Mi malkovris la revuon kiu tre plaĉis al mi, kaj pro tio mi decidis aliĝi al ATEO. Tamen mi volas informi vin ke, malgraŭ la multnombraj inervenoj, mi ne bone komprenis vian demandon "Ĉu libera merkato por vendistoj de kredoj ?".

Mi persone opinias ke homoj bezonas kredi (je io ajn), kaj pro tio sen neŭtralaj informoj, estas facile "aĉeti" kredojn. Neŭtralaj informoj signifas historiajn vidpunktojn pri multaj diversaj kredoj kaj religioj, tiel ĉiu havu propran ideon sciante kio okazis antaŭe, kaj kiel tiu aŭ tiu kredo aperis.

Véronique Bichon (Francujo)

-=-=-=-=-=-=-=

Delonge mia intereso iris al kunveno de ATEO sed iel ne venis ŝanco ĉeesti en ĝi kaj en Hanojo mi sukcesis. Kun ĝojo kaj intereso mi observis la kunvenon unue ĉar multajn konatajn vizaĝojn mi trovis tie kaj la temo mem interesis.

En Koreio la vendistoj (precipe kristanaj) de kredoj tiel bone uzis kaj uzas liberan merkaton, ke ĉie en Koreio oni vidas preĝejon kun kruco eĉ en eta vilaĝo. Sed ĝi ne nepre signifas, ke koreoj vere religiemas. Laŭ mia penso, koreoj ŝatas aparteni ie, kie multaj homoj troviĝas, kaj ili ŝatas profiti de la kredo por kontakti kredantojn en preĝejo. Ekzemple la nuna prezidanto de Koreio apartenas al iu giganta preĝejo, el kiu li prenis kelkajn ministrojn por la registaro. Oni akre kritikis la aferon sed iris tiel ĝis nun. Mi respektas kredantojn verajn sed mem ŝatas ligiĝi nenie.

Jeong-ok (Koreio)

-=-=-=-=-=-=-=

Mankis iom da tempo por longa diskutado, sed ĉiuj opiniis ke malfeliĉe, jes, nun tiu libera merkato ŝajnas kvazaŭ nedanĝera banalaĵo akceptita de ĉiuj …

La formoj estas diversaj : en mia urbo, nur kelkaj homoj protestis, kiam la urbestro decidis financi la « liberajn » (alivorte religiajn) lernejojn. Kiam oni parolas pri la militoj, oni tro ofte elvokas religiajn kialojn kiel la nuraj konfliktaj kaŭzoj. Kiam mi vizitis Moskvon, estis mirinde vidi tiom da homoj (fakte virinoj) en la preĝejoj.

Mi ankaŭ povus paroli pri la granda loko rezervita por religiaj aferoj en la elsendoj de radioj kaj televidoj (eĉ naciaj, ekzemple France Culture, kvankam ni havas leĝojn, kiuj povus helpi nin).

Jes, la konstato, unuanima, estas ke religio invadis la publikan sferon, sub formo de preĝoj, procesioj,… sur la stratoj (ĉiuj religioj).

Necesas bone observi, analizi por lukti kontraŭ io, sed nun, laŭ mi, nia nura zorgo devus esti : kion fari por iom da lumo enmeti en tiun obskurismon ?

Informi, klarigi, eduki, paroladi, kune lukti, interŝanĝi niajn spertojn, sed ankaŭ aŭskulti la homojn, kiuj kredas, por pli bone kompreni kaj analizi ! « Vous voudriez au ciel bleu croire, je le connais ce sentiment, j’y crois aussi de temps en temps, comme l’alouette au miroir, ce qu’on fait de vous hommes femmes, … » Louis Aragon (laŭvorte : « vi ŝatus je la blua ĉielo kredi, mi bone konas tiun senton, eĉ ankaŭ mi foje kredas, kiel la alaŭdo je spegulo, viroj kaj virinoj, kion ili faris el viaj vivoj,… »). Sed,

Kiom da mortintoj, nome de religioj ! Ĉu vere ne sufiĉas ?

Uzante sian menson, eĉ kredantoj povus tion kompreni !

Martine Ragonnet (Francujo)

-=-=-=-=-=-=-=

Estis interese aŭdi la opinion aŭ sperton de la ĉeestantoj unu post la alia. Mi ne scias ĉu tio rilatas al la temo, sed ĝenas min ke necesas sin difini apriore a-teisto : kaj tio certe kondukas al kreado de religio sen dio. Ekzemple en Melburno mi vidis reklamojn pri ateismo sur la tramoj, kvazaŭ necesas imiti la grandajn afiŝojn, kiuj anoncas ke Jesuo estas revenanta aŭ la grandajn skribaĵojn el la Biblio antaŭ preĝejo ĝuste je angulo de strato, kie la aŭtoveturantoj devas nepre resti senmove dum la trafiklumo ruĝas.

La religioj por mi estas iom kiel la mitologio de la romianoj aŭ grekoj. Mi sentas la bezonon nek diskuti pri dio, nek grupiĝi kun aliaj homoj laŭ tiu kriterio. Sed gravas al mi kiel la aliaj rilatas al mi kaj reciproke kiel mi rilatas al la aliaj homoj.

Franciska Toubale (Aŭstralio)

-=-=-=-=-=-=-=

Certe, kiel franco, t.e. heredanto de Voltaire kaj de la Lumoj, mi ege favoras la liberan parolon. Ĉu tiu verkisto ne diris : "Mi tute ne pensas kiel vi, sed mi pretas batali, por ke vi povu libere esprimi vian penson."

Sed kiel respublikano mi opinias, ke necesas esprimi sian penson kadre de la leĝoj de la Respubliko. Ankaŭ mi ege laŭdas laikecon, kiu permesas al ĉiuj vivi kune. Mi asertas, ke laikeco estas la plej grava altvaloro, kiun Francio povas alporti al Eŭropo ; do la vojo al tiu celo ŝajnas ankoraŭ longa. Sed espero motoru nin !

Bernard Sarlandie (Francujo)

-=-=-=-=-=-=-=

Ĉu en demokratiaj ŝtatoj oni povas libere disvastigi ĉiujn ideojn ? Ĉu oni devas akcepti tion ? Ne ! Neniu povas akcepti disvastigon de ideoj, kiuj endanĝerigas la propran modelon de demokratia ŝtato. Ekzemple, religia fundamentismo kiu postulas teokratan ŝtaton (tio estas ŝtato regata de religiuloj) estas neakceptebla ene de demokratiaj ŝtatoj, ĉar por efektivigi tian celon, necesus detrui la demokratian ŝtaton mem.

Demokratia ŝtato povas ekzisti nur kiel nereligia ŝtato. En religiaj ŝtatoj ne eblas disvastigi kontraŭreligiajn ideojn. En religiaj ŝtatoj eĉ ne eblas disvastigi religiajn ideojn, se ili estas malsamaj de tiuj de la regantoj.

Ene de nereligiaj ŝtatoj, ateismo aŭ agnostikismo estas pli natura ol di-ismo, ĉar di-istoj (tio estas : unu-diistoj) emas al ununura vero, do al regado de dio, do al religia ŝtato. Tio tamen ne signifas, ke oni permesus nur ateismon aŭ agnostikismon. Tio nur signifas defendi la rajton de ĉiu esti religiema aŭ nereligiema laŭ sia deziro. Do, toleremo pri religiaj aferoj estas esenca parto de demokratia reĝimo. Defendi ateismon kaj eĉ ĝin dissemi postulas unue defendi demokratian ŝtaton.

Tamen, povas okazi, ke per demokratiaj rimedoj oni voĉdonas por religiema ŝtato. Pro tio estas dezirinde, ke oni konsentu, ke la ŝtato estu laika. Kompreneble, oni povus postuli tion en la konstitucio de la ŝtato. Sed ĉu tio sufiĉos ? Mi dubas. Sed ne ekzistas ia supera politiko (metapolitiko) por malhelpi tion.

Luís Ladeira (Portugalujo)

-=-=-=-=-=-=-=

Kvankam mi estas ateisto kaj havas fortajn starpunktojn ĉi-rilate, mi ne emas aliĝi al ATEO. Memanalize, mi havas la impreson ke mi emas konstante pli multe retiriĝi de organizitaj grupoj, sed estas malfacile koni la veran psikologian kialon de tiu malemo engaĝiĝi. Eble temas pri aĝo, velkanta energio … kiu scias ?

Ĉiuokaze, mi deziras al vi pli da

apogo de aliaj ĉeestintoj. Pri la temo citita, mi nur povas komenti ke mi supozas ke la historia situacio ne multe ŝanĝiĝis : tiuj kiuj volas “vendi” siajn kredojn havas liberan “merkaton” en kelkaj lokoj kaj estas absolute malpermesataj en aliaj.

Diccon Masterman (Italujo)

-=-=-=-=-=-=-=

Mi bedaŭrinde ne akurate alvenis al la kunveno, kaj aŭdis nur la intervenon de tiu viro, kiu en Usono povis trovi sociajn interrilatojn nur kadre de iu eklezio.

Tio min konsternis, eĉ se tiu eklezio estas priskribita tute malfermita kaj gastema al nekredantoj. Aperas, ke tiulande socia vivo eblas nur sub religio, kaj ke ŝajne ne ekzistas asocioj, kie oni simple agadus, renkontiĝus, kadre de simple sportaj, sociaj, kulturaj aranĝoj.

Tiu deviga kontakto kun religio plene rilatas kun la ĉijara temo « Ĉu libera merkato por vendistoj de kredoj ? ». La origina problemo kuŝas en tio, ke en multegaj landoj ŝtato apogas sin sur religio, aŭ estas pli-malpli intime ligita kun ĝi. Plej ofte, kiam oni aŭdas pri kredo-libereco, oni devas kompreni, ke ĉiuj libere kredas je io, sed estas neimageble aŭ neelteneble, ke iu povas tutsimple NE kredi je iu ajn supera potenco. Iu ajn vendisto de iu ajn kredo estas rigardata pli respektebla (pli inda vivi) ol iu, kiu montras sian nekredemon. Kaj se la « oficialaj » religioj ne sufiĉas, abunde floras multaj diversaj proponoj de diversaj sektoj, kiuj ofte ja tre bone scias, kiel enkarcerigi la mensojn, de tiuj, kiujn ili tiom efike allogas, profitante la malforton de siaj viktimoj.

Granda diferenco estas inter religiemuloj kaj ateistoj : oni malfacile trovos ekzemplojn de ateistoj, kiuj murdus iun, ĉar li-ŝi estas kredanto. Male sennombraj estas la intaj kaj antaj murdoj pro religio.

Ateistoj ĝenerale respektas (lasas al ili la rajton vivi) la kredantojn, kiuj ajn ili estas. Ili delonge atendas, ne malofte je kosto de sia propra sanbonstato aŭ vivo, ke en multaj lokoj de nia mondo kredantoj respektu ilian nekredemon.

Janine Dumoulin (Francujo)

-=-=-=-=-=-=-=

Laŭ la Israela leĝaro ĉia misiisma agado estas strikte malpermesata, dum paralele ekzistas vasta libereco por ĉia di-kultado. Ĉio ĉi validas por islamanoj, diverssektaj kristanoj kaj bahaanoj. La bahaanoj (kiujn mi daŭre preferas pro ties profunda humanismo al niaj “samgentaj” jud-ortodoksuloj) agadas misiisme en la tuta mondo el sia Monda Centro en Hajfa, sed ili subskribis specialan interkonsenton kun la Israela registaro, laŭ kiu ili strikte observas la malpermeson

kontraŭ misiisma agado interne de Israelo. Kompense ili ricevis liberigon de diversaj impostoj rilate al siaj multegaj havaĵoj, eĉ ne prikultaj, en la regiono de Hajfa (plejparte loĝejoj por siaj multaj volontuloj). Ankaŭ la mormonoj, same misiismemaj, devis subskribi similan interkonsenton antaŭ ol ili konstruis mormonan universitaton en Jerusalemo.

Pli malfacile estas kontroli kaj regi la agadon de la multspecaj sektoj, el kiuj inter la plej famaj estas la scientologio — kvankam ĝuste kontraŭ tiaj sektoj, okupiĝantaj ofte pri cerbolavado, ekzistas aparta leĝo.

Sed neniu el la tiuj leĝoj validas kontraŭ la sola vere misiisma agado treege populara en Israelo : tiu de la diverstendencaj jud-ortodoksaj institucioj inter siaj sampopolanoj, t.e. sekularaj judoj. Mi persone konsideras la membrojn de ĉiuj tiuj institucioj ne-judaj, kiuj kamuflas sin kvazaŭ ili estus judoj. Ili ĉiuj opinias sin esti la solaj veraj judoj, ne rekonas persone kaj oficiale judojn de aliaj religiaj tendencoj, kiel la reformismaj, la konservemaj (nome, tradiciemaj) kaj aliaj. Laŭ mi nenio en iliaj doktrinoj kaj propagandaĵoj estas esence juda, sed helpe de la registara kaj privata helpo (ĉefe mona) ili sukcesas tralavi multajn cerbojn. Dank' al sia membreco en preskaŭ ĉiuj registaraj koalicioj ekde la ŝtat-fondiĝo, ĉi tiuj institucioj kiel politikaj partioj trudas laŭleĝe observadon de parto de sia religia leĝaro al la plimulto de la Israela socio, kiu ne estas aparte religia (kaj parte eĉ ne estas juda !).

Ĉar ne ekzistas ajna leĝo kontraŭ tiaspeca misiismo fare de tiaj jud-ortodoksaj institucioj, kaj ĉar ne ekzistas ajna ebleco pri agado en la malan direkton (mi, ekzemple, ne rajtus prelegi en **ilia** kulturdomo pri la teorio de Darwin) — miaopinie, tute ne devus ekzisti la **nuna leĝo** kontraŭ misiismo, kiu ne inkluzivas tian ortodoksan specon. Des pli, kiam tiu ĉi cerbolavado aldoniĝas al la jam ekzistanta perleĝa trudado de judortodoksa geedziĝo, entombigo kaj ĉesigo de publika transporto dum sabatoj kaj religiaj festoj.

Mi opinias, ke la leĝo kontraŭ misiismo nun ekzistanta neniel efikas kontraŭ la sola misiismo praktikata en Israelo, tiu de la jud-ortodoksuloj. Mi eĉ ne antaŭvidas, ke en la estonteco eblos krei leĝon malpermesontan ajnan misiismon. Kaj tial, mi la ateisto, konsekvence devas strebi al kompleta libereco de misiisma agado.

Jehoshua Tilleman (Israelo)

-=-=-=-=-=-=-=

Tiu temo elektita de Anna Löwenstein bezonus klarigojn por taŭge respondi, kaj tial ne estu desapontitaj, se mia teksto estas

ekstertema.

En la nocio "libera merkato", mi komprenas ke la homoj rajtas plej libere, entrepreni, krei firmaojn, aĉeti, vendi ktp ĉu inter homoj ene de sama lando ĉu ankaŭ inter la landoj, tamen pagante kelkajn impostojn al sia registaro aŭ al aliaj registaroj.

Do, ĉu oni povas aŭ devas apliki tiun liberan merkaton al kredoj ? Ĉu kredo estas varo kiel aliaj varoj ? El vidpunkto de religiano, mi supozas ke la kredoj estas pli sanktaj ol ĉio, sed de vidpunkto de ateisto kiel mi, tiu merkateco de la kredoj min ridigas kaj pruvas al mi, ke la kredoj estas bagateloj.

Kompreneble, se tiu merkato nur utilus por konstrui kelkajn preĝej-konstruaĵojn, estus normale, sed plej ofte tiuj merkatoj utilas por riĉigi kelkajn homojn. Kaj tiuj homoj kiuj profitas de la religioj por riĉigi sin, pruvas ke ili ne estas kredantoj.

Do, ĉefe, la problemo koncernas la naivulojn kaj la profitantojn. Sed, ne nur. Plej ofte la donacoj de eklezianoj al profitantoj estas dekalkulataj de la impostoj, priŝtelante la aliajn imposto-pagantojn kiuj, sekve, pagas pli. De tio, eblas dedukti ke la kredoj ne estas sufiĉe liberaj kaj justaj. La kredoj devas esti liberaj tiom kiel la nekredoj.

Due, kie okazas la enterigoj de la mortintoj, ĉu nepre en religiaj lokoj aŭ eblas enterigi ilin en neŭtralaj lokoj aŭ, kial ne, en ateaj lokoj ? Klare, ĉu eblas enterigi en libera loko ? Ĉu la merkato pri la morto estas sufiĉe libera ? Pri tiuj problemoj, ĉiuj, kiuj fakte estas estontaj mortintoj devas antaŭzorgi pri siaj enterigoj.

Trie, en la vorto "libera merkato" estas la vorto "libera". Ĉu la libereco koncernas la komunumojn aŭ la individuojn ? Se la komunumoj estas liberaj, kvankam en la komunumoj mem la individuo ne estas en plena libereco, do la merkato ne estas vere libera.

Kvare, la libera merkato koncernas tiujn kiuj estas en la cirkvito de la oferto kaj de la bezono, t.e. ke la malriĉuloj ne povus decidi por si mem. Tiam la ŝtato devus permesi al tiuj povruloj antaŭdecidi por siaj diversmanieraj enterigoj.

Kvine, ene de la familioj, kiel funkcias la "libera merkato" ? Ni imagu, ke filo aŭ filino ribelas en la familio kaj rifuzas sekvi la religiajn kutimojn. Mi supozas ke li ricevos vangofrapon kaj devige sekvos la kutimojn de la parencoj. Do, en la edukado, ĉiuj vidpunktoj devas esti prezentataj al infanoj ekde la dekkvarjara aĝo. En antaŭaj tempoj, tio estus malfacila afero sed nun dank' al la modernaj amas-komunikiloj, la infanoj povas informiĝi pri multaj demandoj kaj elekti propran vojon kaj konduton.

Resume, "ĉu libera merkato por la kredoj ?" jes !! sed ankaŭ libera merkato por ĉiuj pens-manieroj. La

laboro de la sendiuloj devas esti firma kaj tial la sendiuloj devas afiŝi sian sendiecon jam dirante trankvile : mi estas sendiulo. En franca lingvo tiu vorto "sendiulo : mécreant" estas vortaĉo. Al la demando "ĉu vi estas kredanto ?", oni devas respondi : "mi estas sendiulo, kompreneble". La vorto "kompreneble" estas grava por montri ke la sendieco estas evidenta.

Oni povas aldoni "mi esperas esti enterigita ekstere de la religiaj tombejoj."

Ha ! Mi preskaŭ forgesis gravan problemon. Kio estas "kredo" ? Ĉu nur kredi je iu dio kaj iri al preĝo, adori iun dion, aŭ kredi la dirojn de Religia Libro. Plej ofte la diroj de Sankta Libro kontraŭas la liberecon kaj devigas multajn aferojn al la kredantoj. Oni devas distingi la kulton de la religio. Estas grava afero ke la religianoj lokas la dion (aŭ diojn) kaj ties preceptojn super sia libereco kaj, eĉ pli grave, super la libereco de la aliaj. Klare, multaj religianoj devigas la aliajn sekvi sian religion. Ankaŭ pli firme, la ateistoj devas aserti sian sendiecon spite tiujn faŝistojn. Sufiĉas diri al ili : "la dioj ne ekzistas ! Se la dioj ekzistas, pruvu tion kaj bonvolu prezenti vian dion aŭ diojn antaŭ mi".

Michel Ahado (Francujo)
Michel.ahado@laposte.net
www.ekoloro.blogspot.com

-=-=-=-=-=-=-=

Mia reago : "jes, sed kun la samaj reguloj aplikeblaj al reklamado pri varoj". Se oni provas vendi en Italujo aŭtomobilon asertante ke ĝi estas miraklofara, ke ĝi igas vin feliĉa en la vivo, ktp, la mensoga parto de la reklamado estas malpermesata (eĉ se la vendisto mem estas konvinkita, ke ĝi estas vera). Tiun leĝon ne malofte oni aplikis pri televidaj vendoj de magiaj ĉionsolvaj produktoj.

Alivorte neniu religio rajtas vendi sin mem.

Renato Corsetti (Italujo)

-=-=-=-=-=-=-=

La problemo ŝajne kolizias kun tute alispeca kiu ne koncernas la kredojn, sed la politikon, alidirite la tipon de socio kiun la civitanoj elektis en difinita lando : ĉu la merkato mem estas io privata aŭ publika (aŭ eĉ ŝtata) ? Ĉu socio kapitalisma aŭ socialisma ? Mi supozas ke nur respondinte al tiu demando (aŭ precizigínte la socian kaj politikan kuntekston), oni povas respondi al la alia demando (ĉu libera merkato por kredoj ?).

Se tutaj sekcioj de publikaj servoj (ekz. edukado) ne estus privatigitaj en Francujo, la leĝo de 1905 pri laikeco ja restus plu aplikebla laŭ historie pli normalaj principoj ! Tio signifas ke kadre de privata merkato, efektive ĉio eblas. Ekzemple en Francujo, eĉ en

laika parto (nur proksimume 3% de la teritorio ne estas koncernata de laikaj principoj oriente de la lando) nun aperas universitatoj pri komerca rajto laŭ muzulmanaj ritoj ! En Angers (urbo proksima al la esperanto-centro Greziljono) eĉ ekzistas katolika universitato !

La leĝo mem celas distingi la privatan kaj publikan perimetrojn. Prave laŭ mi. Cetere, la ŝtato administras la publikan merkaton, en kiu religio ne povas ĉeesti. Sed ene de la privata merkato ...

Konklude : unu plia malavantaĝo de tro vasta privatigado de tio kio estis ŝtata aŭ publika, do apartenis al ni ĉiuj, kun garantioj pri neĝeno de religiaj entrudiĝoj.

Christian Rivière (Francujo)



Ĉu povas ekzisti etiko sen Dio ?

Ĉu etiko povas sendependiĝi de religio ?

En ĉi tiu artikolo ni klopodos pruvi ke etiko, se oni volas ke ĝi estu universala, ne povas dependi de Dio aŭ de religio. Kial ?

Se etiko devas utili al ĉiuj, ĝi devas naskiĝi de malalte kaj ne povas esti donata de iu supera instanco. Ĉar se oni prenas siajn fundamentojn el Dio, minimume tio ekskludos la ateistojn, kaj do ĝi certe ne povos esti universala kaj kundividita de ĉiuj.

Tio estas unu el la ĉefaj kialoj. Sed, ni supozu ke ĉiuj kredas je la sama Dio. Ĉu tio sufiĉus ?

Unue, por ke ĉi tiu hipotezo fariĝu reala, oni devus elekti Dion. Sed kiun elekti ? Ĉu la Dion de Abrahamo ? Sed eĉ la tri grandaj abrahamidaj religioj ne konsentas inter si kaj havas grandajn etikajn diferencojn : ekzemple la poligamio en islamo.

Do, eble, por havi kundividitan etikon, derivantan de Dio, necesus ankaŭ ke ĉiuj estu kredantoj de sama religio.

Do, estas evidente ke etiko fondita sur Dio, povas esti nur relativisma kaj dependa de la identecoj, de ĉiuj religioj, kaj tia afero ne povas ne konduki al batalo inter la diversaj

identecoj. Krome ni devas diri ankaŭ ke la religiaj moraloj montriĝis nepovaj alfronti multajn novajn demandojn pri etiko, kaj eĉ apartenantoj al samaj religioj atingas malsamajn solvojn, kiel ekzemple kristanoj antaŭ problemoj kiel eŭtanazio, pri kiuj oni devas atendi ofte interpretojn de iu hierarkie pli alta, kiel ekzemple la papo.

Supozo de unu dio

Sed ni supozu, absurde, ke ekzistas Dio kaj ke ĉiuj kredas je unu Dio. Tiakaze ni devus tamen ankaŭ kredi ke tia Dio ne nur kreis la mondon sed ankaŭ similas al ni pri rezonado kaj volo[1].

Nun ni devas kompreni, kial tiaj kredantoj, ĉi-kaze, taksus la vivon etika nur se oni devenigas ĝin el tia Dio.

Do, unue ili opinias ke nur devenigante la etikon de Dio oni povas doni firman fundamenton al la etiko ; due ili opinias ke nur ekkoninte la planon de Dio pri la mondo, oni povos trovi la fundamentajn leĝojn kiuj inspiros nian etikon : la natura leĝo.

La unuaj rimarkoj pri tio estas ke eĉ en kristanismo oni ne konsentas pri tio, kio estas la morala instruo. Eĉ la kristanaj instruoj ne akordiĝis : kiu estas la vera interpretisto de la volo de Dio ? Katolikoj diras la Papon, protestantoj la kredantojn mem. Se ne paroli pri bioetikaj aferoj : eŭtanazio, geedziĝo de samseksemuloj, kontraŭ-koncipiloj. Kaj similaj malakordoj ekzistas en la du aliaj monoteismaj religioj.

Ni supozu, tamen, ke ĉiuj kredas je unu Dio, ĉiuj estas kredantoj de la sama religio kaj ke ĉiuj konsentas pri la samaj moralaj leĝoj (en la realo iom absurda, sed ni hipotezu).

Unua hipotezo : nur deveno de Dio donas fundamenton al etiko

Kial konduto ordonita de iu aŭtoritato devus esti pli morala ?

Taksi etika konduton ĉar donitan de iu aŭtoritato estas kiel forpreni de tiu konduto la moralan valoron. Kio estas pli morala ? Se via filo ne faras ion maljustan ĉar vi admonis lin kaj minacis per puno aŭ se li ne faras ĉar li mem decidis aŭtonome, sen ke vi admonu aŭ sugestu ?

Konduto estas morale bona sendepende ĉu temas pri ordono. Perforto kontraŭ homo estas malbona sendepende ĉu temas pri ordono de iu pli alta aŭtoritato. Sklavismo estas malbona kvankam Biblio neniam kondamnis ĝin.

Male, se oni fondas la bonon de tia

1 Nuntempe oni scias ke la universo estas formita de multegaj steloj. Nia galaksio havas inter 100 kaj 200 miliardojn da steloj, eĉ supozante ke nur po unu el miliardo havas planedon kun viva estaĵo, ni havus inter 100 kaj 200 planedojn. Ekzistas 100 miliardoj da galaksioj, do, ekstreme minimume almenaŭ miliardo da planedoj posedas vivajn estaĵojn. Ni scias kiel homo sur Tero formiĝis kaj venkis en la lukto por evoluo, kaj tia hazardo estas preskaŭ neebla en alia loko, do tio signifas ke *homo sapiens* estas apartaĵo ekskluziva por Tero. Kaj tio ne ekskludas la ekziston de nenombreblaj aliaj vivestaĵoj raciaj en la universo, kiuj versâjne reproduktigâs, vivas, tute alimaniere ol ni. Do hipotezi etikon universalan donitan de Dio por tuta universo estus vere absurda ekzercado.

ago sur la fakto ke ĝi estas tia, ĉar ĝi estas ordono de Dio, oni reduktas tian bonan agon al nur obeo de komando[2], forprenante aŭtonomecon al individuo.

Tiel oni reduktas la moralecon al io simila al reguloj de etiketo, validaj inter la membroj de societo aŭ inter tiuj, kiuj agnoskas la saman aŭtoritaton.

Do, tiaj agoj perdas la universalecon de sia justeco en si mem.

Se oni serĉas la justecon de ia ago en la obeo de ia supera aŭtoritato, ne ekspluatante sian aŭtonoman forton de decido, en la momento en kiu malaperas la aŭtoritato, oni falas en la nihilismon de la fama frazo : "Se Dio mortus, ĉio estus permesata".

Dua hipotezo : ekkoni la planon de Dio kaj malkovri la naturan leĝon

Kiel dirite pli supre, kredantoj opinias ke eblas trovi la justan etikon (la dian) en la legôj de la naturo. Kaj en la legô de naturo, Eklezio asertas trovi la respondojn por administri la seksan vivon, familion, manierojn naski gefilojn, manierojn morti kaj manierojn kuraciĝi, ktp.

Sekvi la fluon de la naturo kaj ĝiajn leĝojn estas sufiĉe sensence, ankaŭ ĉar la naturo entenas ĉion : de murdistoj ĝis sanktuloj, de egoistoj ĝis donacemuloj. Difini sian moralon kiel naturan, por la homo, kutime signifas klopodi difini naturan aŭ laŭ naturo decidon akordan al tio, kion oni volas malhelpi, kondamni aŭ koncedi.

Ankaŭ malsanoj estas naturaj kaj oni devus lasi sin porti de la fluo de la naturo kaj kuraci sin nur per naturaj rimedoj ? Gejeco estas tute natura (ĝin oni povas trovi en ĉiu speco de besto, sed ŝajnas ke ĝi estas kontraŭ iu leĝo natura, almenaŭ kiel difinita de Katolika Eklezio), ĉasteco male estas la plej kontraŭnatura konduto (en neniu besto ĝi troveblas), sed tamen ĝi estas konsiderata virto de Eklezio.

Diveni la naturan leĝon signifus malkovri tion, kio okazas, sed etiko okupiĝas pri tio, kio devus esti, aŭ pri tio kiel devus esti nia estonteco, pri tio kio estas bona aŭ malbona, por tiel klopodi plibonigi la vivon evitante suferojn kaj emon damaĝi unu la alian.

Se ni nur serĉas la naturajn leĝojn ni pasive akceptas valorojn kiuj devus gvidi niajn elektojn en situacioj ĉiam novaj kaj malsamaj de la pasintaj.

Nekohereco de tiu, kiu kredas ke ne ekzistas etiko sen Dio

Se oni kredas je Dio, ĝenerale oni atendas ankaŭ "premion" pro morala vivo, kaj male punon pro malbona konduto. Kaj do etika konduto neniam povos esti neprofitema, male al tiu kiu kondutas bone kaj ne kredas je iu puno aŭ premio.

2 Multaj kredantoj kiam oni rimarkigas tion, asertas, ke ili kondutas bone ne pro komando de Dio, sed pro tio, ke ili taksas ion justa. Nu, se estas tiel, tio signifas ke ili mem estas konvinkitaj ke etiko ne devas ligiĝi al Dio, kaj ke se ne ekzistus Dio ili povus konduti bone, kiel povus ĉiu ateisto.

Efektive minaco de puno fare de Dio estas kroma ilo por tiuj, kiuj volas trudi iun etikon al la popolamaso, tiel kontrolebla per ĉi tiuj punoj.

Moralo fondita sur dio unuigas moralon kaj leĝon

Se oni ligas moralon al Dio, oni emas taksi justa la trudon de la moralo (la nura moralo) per leĝa forto. Kaj do trudi sian moralon al aliaj nekredantoj aŭ kredantoj je alia Dio estas tute juste.

Kiu taksas moralon kiel serion de absolutaj komandoj devenantaj rekte de Dio, ne povas akcepti ke Ŝtataj leĝoj estu kontraŭ tia moralo, kaj pro tio sentas sin pravigita faligi tian ŝtaton per iu ajn perforta maniero. Oni komparu la nuntempajn instigojn de la papo al apotekistoj kiuj ne vendas kontraŭkoncipilojn aŭ pilolon de la posta tago[3].

La interrilato, do, de tiu kiu kredas ke propra moralo devenas de Dio ne povas ne esti netolerema[4].

Se oni opinias ke etiko fundamentas en la volo de Dio, ne ekzistas areo de homa vivo kie ĝi ne validas. Ĉiuj etikoj fondiĝantaj sur religio estas la plej invadaj kaj vivkontrolaj. Sufiĉas legi la sanktajn librojn de la monoteismo por rimarki kiel ĉiu plej malgranda parto de homa vivo estas okupata de devoj : vestoj, manĝaĵoj, higieno, ktp. Daŭre nun katolika eklezio preskribas seksajn kondutojn de propraj kredantoj, eĉ se plenkreskaj, kaj ne damaĝajn por aliaj.

La distingo inter moralo kaj juro havas sian bazon en la fakto ke kondutoj ne damaĝaj por la aliaj ne devas esti punataj kiel krimoj ; maksimume oni povas aprobi aŭ malaprobi. Kaj oni ne rajtus devigi homojn al ia konduto kun la preteksto ke tio estas bona por li, kvazaŭ patrece. Ni rimarku la kondutojn rilate naskon, morton kaj kuracadon flanke de Katolika Eklezio. Ĝi pretendas trudi al ĉiuj, por ties bono, la manieron kiel naski gefilojn, kiel formi familion, ktp.

Psikologiaj sekvoj

Dum kiu ne kredas je Dio havas neniun influon sur propra morala karaktero, kredi la malon kreskigas la opinion ke ĉiu ago estas kontrolata kaj ke oni devas konduti iel ĉar estas supera ordono, kaj devojigas la menson el la efektivaj suferoj de la aliaj. Oni nur pensu pri la malpermesoj en la seksa kampo, ekzemple en la masturbado kie, kvankam oni damaĝas neniun, oni ricevas malaprobon.

La fideleco al dia leĝo malhelpos, unuflanke ke propra etika konduto estu orientita tuj kaj rekte de sentemo

3 Tia estas konduto de teokratiaj ŝtatoj, ĉu pli aŭ malpli fortaj : de Irano, ĝis la iama Eklezia Ŝtato, kiu nuntempe, sub alia nomo, klopodas influi la leĝojn de fremda ŝtato kiel Itala Respubliko kaj ofte plifortigas siajn argumentojn nomante siajn valorojn "nenegoceblaj".

4 Oni diru ke tia konduto en Italio estas pli konforma al katolikoj ol al protestantoj, kiuj subtenas plenan disigon de la religia povo disde la ŝtata.

al suferoj de siaj similuloj, kaj aliflanke malhelpos ke tiu sentu sin responsanto de siaj elektoj. Do tiu pli zorgos obei la leĝon ol malpliigi la suferojn de aliuloj.

Kreo de etiko sen ligo al dio

Kaj nun, post la "detruo" ni klopodos konstrui manieron krei etikon neligitan al Dio.

Ĝenerale nekredantoj aŭ tiuj kiuj ne fidas je ekstera aŭtoritato por serĉi pravigojn de siaj moralaj principoj, povas serĉi libere kaj sen antaŭjuĝoj tion, kio valoras por distingi la bonon de la malbono.

Kiel jam dirite : nur kiu liberiĝas de religiaj dogmoj povas esti en la situacio akiri moralan responson.

Do, unue oni devas liberiĝi je eksteraj kondiĉadoj : gepatroj, geamikoj, majstroj, ktp (Mi faris tion ĉar ordonis tiu ...)

Nur kiam oni prenas sur sin la responson de tio kion oni faris, kiam oni klarigas siajn kialojn pro la faro de io, oni aliras la moralan sferon.

Granda diferenco inter la religia kaj la morala perspektivoj kuŝas en la konscio esti aŭtonoma, libera individuo, male al la religia perspektivo kiu kondamnas tion, kiel orgojlan pekon.

Aŭtonomeco, konscio kaj responso

Do, por komenci, ĉi tiuj tri kvalitoj estas fundamentaj. Kompreneble ili ne sufiĉas, necesas serĉi regulojn kaj kriteriojn etikajn agnoskeblajn kiel niaj por legitimi nian konduton.

Krome, ĉi tiuj kvalitoj devas esti agnoskataj al ĉiuj membroj de nia specio (kaj eĉ al kelkaj simioj).

Do, etiko sen Dio agnoskos ekziston de granda nombro da personoj morale responsaj, kaj pro ilia aŭtonomeco kaj libero ni devos kalkuli je granda diverseco en la manieroj konduti morale kaj response.

Sentemo al komuna homeco kaj justosento

Realigo de plena persona kresko, ne pasas nur tra la aŭtonomeco kaj libero, sed ankaŭ tra sentemo kaj atentemo al la aliaj.

Etiko ligita al Dio konsciigas homojn pri agnosko de morala graveco de la aliaj, surbaze de koncepto ke homoj apartenas al homa genro kreita de Dio kun privilegia statuso.

Scienco kaj studoj pri evoluo portis nin al pli naturisma klarigo de la kialo de la memkonscio de morala responso al propraj similuloj.

Kiam ni ekkonscias pri nia aŭtonomeco de morale responsaj estaĵoj ni komencas percepti la gravecon de suferoj kaj doloroj de aliuloj, kaj tia percepto transformiĝas al instinkta partopreno en la sufero, kiu fariĝas malpliigenda aŭ forigenda. Tio ne postulas nian apartenon al speciala loko en la universo, kiel asertas religio. Sufiĉas la natura simpatio (en fizika senco) kun la

emocioj de la aliuloj. Tia simpatio moviĝas pli senpere kaj rekte al personoj apartenantaj al nia cirklo, por plilarĝiĝi al la tuta homa specio, ĝis partopreno en la suferoj de la aliaj bestoj.

Tia natura simpatio estas science pruvita. Psikologoj de infana evoluo dokumentis ke jam trijaraĝe membro de homa specio, sen afekciaj problemoj, ne nur reagas emocie kiam ĝi vidas alian infanon plori, sed emas helpi, eĉ se ne tute kongrue, ekzemple donacante sian pupon.

Tia partopreno en la emocioj de aliuloj transformiĝas en justosento : same kiel ni sentas negativaj kaj evitindaj dolorojn kaj suferojn, kaj ni ĝuas kiam ili malpliiĝas, pro egaleco ni ne povas resti indiferentaj antaŭ doloroj kaj suferoj de aliuloj.

Tia nocio de justeco ne trovas pravigon en obeo de leĝo de supera aŭtoritato, valida por ĉiuj homoj ĉar kreitaĵoj de Dio, sed ĝi estas nia instinkta partopreno en la kondiĉoj de tiuj agnoskataj kiel niaj similuloj, kiu devus ankaŭ plivastiĝi al aliaj bestoj suferipovaj.

Do la kapablo distingi inter bono kaj malbono, justo kaj maljusto estas enradikiĝinta en la homa naturo[5].

Etiko sen Dio havas la kapablon korektiĝi kaj plivastiĝi surbaze de niaj apartaj spertoj pri la efektivaj situacioj de niaj similuloj. Ĝi transformiĝas konstante : torturo, perforto, egaleco de ĉiuj homoj, krueleco kontraŭ bestoj, estas kondutoj kiuj ŝanĝiĝis nature, kvankam dum jarcentoj, kun la samaj sanktaj libroj, ili neniam povis ŝanĝiĝi. Fakte moralo fondita sur religio restas fiksa kaj devigas al penaj interpretaj rezonadoj por registri la transformojn, kiuj tute nature signas la homan historion.

Kaj uzante simple siajn kutimajn emociojn, sentojn, rezonadon kaj pripensadon oni povos agnoski la principojn, la regulojn kaj normojn kiuj inspiras moralan vivon. La premio ne estos loko en ia paradizo, sed la konscio ke oni faris ion justan, bonan kaj devan. Kaj se oni rimarkos ion maljustan kontraŭ si aŭ kontraŭ aliaj, oni engaĝiĝos por malhelpi ĝin, ne povante kontentiĝi je ia eventuala postviva ekzisto.

Alia grava punkto en la kontraŭstaro inter la kredanto kaj la aŭtonoma kaj responsa laikulo estas ke la religia koncepto implice bezonas formi fanatikulojn, t.e. homoj absolute konvinkitaj de praveco de siaj principoj kaj valoroj, kaj do tute ne disponeblaj al iliaj modifoj aŭ pridiskutoj, ĉar devenantaj de dia volo. La kredanto inklinas konformigi siajn moralajn emociojn al tio kio estas preskribita de propra religio, kaj konsekvence li inklinas kundividi nur kondutojn inspiritajn al tiel konstruitaj

5 Estas multaj esploroj pri tia pensmaniero. Iuj moralaj kondutoj estas komunaj al ateistoj kaj al kredantoj. Vd http://moral.wjh.harvard.edu/

sentoj. Liaj moralaj emocioj malfacile estos influeblaj de kritika procezo celanta modifi la konduton surbaze de la sperto.

Alia trajto kutima de la religiaj etikoj estas la asketeco. La idealo de virto estas en la neo de ĉiuj korpaj plezuroj, dum la sendia etiko ne fondiĝas sur ia absoluta ideo de virteco. Konscia de la aŭtonomeco kaj libero karakterizanta la aŭtentikan moralulon, sendia etiko allasas ĉiun individuon elekti sian moralan karakteron.

La virto de la toleremo, do, anstataŭos tiun de la lojaleco al eternaj kaj absolutaj moralaj principoj kaj konsistigos la idealan karakteron moralan en ateisma perspektivo.

Certe ĝi preferos vivon kiu ne ekskludos plezurojn ĉiuspecajn, sed kiu ekskludos izolajn kaj asketecajn formojn.

Sendia etiko do povas ellaboriĝi nur eltirante siajn argumentojn el la homa naturo. Kaj, kiel indikas multaj filozofoj, sufiĉas la racio por havi moralan vivon. Fakte per rezonado oni povas krei regulon kiu esprimas aŭ defendas interesojn de ĉiuj.

Estas tempo forpreni etikon de transcendaj regnoj, kaj ne plu delegi niajn responsojn al "deus ex machina" kies volo estas interpretata de speciala kasto, kiu, interalie, ne ĉiam defendas niajn bezonojn.

Universaleco kaj relativeco de etiko sen dio

Etiko ne plu ligita al komandoj de iu Dio estos pli taŭga por homo, ankaŭ ĉar formiĝos sur realaj spertoj de nia specio.

Fakte etiko fondita sur Dio devas doni absolutecon al abstraktaj moralaj principoj kaj adapti ilin al la elektoj kiujn iom post iom alfrontas la homo.

Tiaj absolutaj principoj ofte malhelpas la atingon de plej vasta envolvo de rajtohavaj[6] estaĵoj.

Dignecon de persono oni respektas defendante ĝiajn petojn kaj efektivajn bezonojn.

Nur nereligia etiko fondita sur la veraj spertoj de homo, povas agnoski historian kaj kulturan relativecojn de mondo kaj universaligi principojn kiel nekreadon de suferoj nedezirataj al alia homa estaĵo. Temas pri universala regulo tute akceptebla obeante niajn sentojn kaj nian saĝecon.

Ene de natura etiko ni povas "kontroli" specifaĵojn kaj situaciojn de homoj en kiuj ili devas decidi ke ili faros ion aŭ juĝos morale. Do, ene de ĉi tiu perspektivo ne estos nekohereco en la diversaj manieroj decidi fare de diversaj homoj. Ĉiu povas havi sian

6 Katolika Eklezio asertas ke homa persono komenciĝas de la koncipo kaj ke ĝia fundamenta valoro estas la digneco. Tio kreas, unue, konflikton inter samrajthavaj estaĵoj : virino perdas siajn rajtojn, kaj tute subordiĝas al viroj ; due, atribuante abstraktan dignecon al homa persono (reprezentita ankaŭ de kelkaj ĉeloj) oni povas eltiri senfinajn malpermesojn, kiel ekzemple la artefaritan fekundigon, kaj ĉiun ajn formon de diagnostika esploro sur kvalito de vivo naskiĝonta.

apartan situacion, kaj decidi iel aŭ alimaniere depende de la periodo kiam io okazas.

Tio kio pravigos konduton, estos ke ĝi ne privilegias unusence individuon, sed ke ĝi estas efektive inspirita de egala konsidero de interesoj de ĉiuj, kiuj estas envolvitaj en la elekto kaj decido. Tio donas la sigelon de npartieco, male al religiaj konceptoj kiuj defendas abstraktaĵojn kiel “komunan naturon de homa persono” aŭ “esencon de la homa naturo”.

La agnosko de universalaj rajtoj moralaj ja povas esti ligita al nia historio kaj ne al dia preskribo : danke al longa historia-kultura evoluo de nia specio, oni nuntempe ne plu diskriminacias pro raso, sekso, monhavo, nacieco, sanstato kaj opinioj. Se ni ligus la agnoskon de la moralaj rajtoj al Dio, oni certe enkrizigus kelkajn areojn de ĉi tiuj rajtoj, kiel ekzemple religia libero (aŭ senreligia libero), seksa libero, egaleco de virinoj, nasko-libero, mortolibero, ktp, kiuj ene de kelkaj religiaj etikoj mankas.

Ateismo kaj nia loko en universo

Nuntempe ateismo povas respondi al multaj niaj viv-demandoj, konsciante ke ĉiu klarigo aŭ respondo, originante el esploro, estos ŝanĝebla kaj parta, anstataŭ lasta kaj definitiva kiel pretendas kreismanoj.

Pier Luigi Cinquantini (Italujo)

Tunizio

Nenia araba printempo por ateistoj

Kiam oni estas tuniziano, sin proklami ateisto grave nocas la sanon. Inkluzive, kiam oni kredas, ke eblas trovi rifuĝejon en Eŭropo.

La regulo estas plej klara : dum ramadano, bona muzulmano devas nek trinki nek manĝi inter sunleviĝo kaj sunsubiro. Tamen ŝajnas, ke por la ege bonegaj muzulmanoj – kun barbo longa je minimume 15 centimetroj – ekzistas esceptaj malobeoj. Oni rajtas ekzemple manĝi ateistaĵon. Ghazi Béji proe suferis dolorigan sperton.

Memoru, Ghazi Béji estas tiu juna tuniziano el Mahdia, marborda urbo 200 kilometrojn sude de Tuniso, kiu, same kiel lia amiko Jabeur Majri, aŭdacis deklari sin ateisto kaj publikigis ĉe Facebook bildojn iom ne respektemajn al Mahometo. Ambaŭ estis kondamnitaj, la 28-an de marto 2012, al sep jaroj kaj duono da mallibero pro « *perturbo de la publika ordo kaj malobservo de la moralo* ». Male de Jabeur Mejri, kiu plu putras en tunizia malliberejo, kie li suferas altrudojn, perfortaĵojn kaj mortominacojn, Ghazi Béji sukcesis forfuĝi el la lando kaj iri ĝis Grekio, esperante atingi Francion por peti rifuĝint-statuson.

Sed post malfacila irado trans Makedonio kaj Bulgario, li finfine estis arestita en Rumanio, kie oni devigis lin elekti inter malliberejo kaj azilpeto. Ghazi Béji elektis la duan solvon kaj sin retrovis en rifuĝejo. Tie li preskaŭ utilis kiel manĝaĵo al iu kredanto iom pli furioza ol la aliaj : « *Tie ĉi, en la rifuĝejo, ili metas ĉiujn kune, ateistojn, integristojn ... Tute senzorge. Ĉi tiu estis Palestinano, li alsaltis min, insulte min nomante* « filo de putino » *kaj mordis min ĉe la ventro. Li formordis karnopecon, mia sango fluegis. Kiam mi plendis al la policistoj, ili diris: «* Ni ne havas tempon »*. Iu el ili tamen demandis, ĉu mi havas monon por iri al la hospitalo. Sed monon mi ne havas...*»

La vundon li malfacile ŝtopis. La tagon post la agresado, Ghazi Béji estis kunvokita far la centrestro : « *Mi diris al li, ke Alĝeriano avertis min, ke kvar Irakanoj kaj unu Siriano min serĉas por min mortigi, kaj ke en la rifuĝejo oni ĉiam nomas min « porko » ... Li nur respondis :* « Eksteren ! Eksteren ! » Amikoj en Tunizio sendis al li 150 eurojn por lupreni apartamenton, kaj li sukcesis akiri de la rumana ŝtato portempan restadkarton por azilpetanto. « *Sed mi daŭre ricevas minacojn, oni diras al mi, ke oni mortigos min. Mi ne plu eliras el la apartamento...* »

DIO DIRIS : « VI NE MANĜETU EKSTER LA MANĜ-HOROJ ! »

Tiu naŭza koŝmaro, kiun oni ŝatus opinii escepta, montras kiom vane estas kredi, ke religia dogmo – iu ajna – povas adaptiĝi kun demokratiaj leĝoj aŭ eĉ, pli modeste, kun elementaj sociaj reguloj, tuj kiam ĝi eliras el la kampo de strikte intima konvinko por eniri la politikan spacon. Tion oni konstatas en Tunizio, kie artistoj, ĵurnalistoj, studentoj kaj laikaj batalantoj suferas kreskantajn perfortaĵojn far iuj rabiaj integristoj, kiuj ĉiutage konkeras pli kaj pli da tereno. Tion oni konstatas en Turkio, kie la modelo de « modera » islamo, kies ĉefa reprezentanto estas ĉefministro Recep Tayyip Erdogan, ĉiam pli montras sian veran vizaĝon, dum ĝi pli fortigas sian povon.

Sed tion oni konstatas ankaŭ en Rusio, kie la ortodoksa eklezio postulas de Kremlo – kiu certe ne rifuzos al ĝi tiun plezuron –definitivan silentigon kontraŭ la membroj de Pussy Riot. En Usono, kie la religiaj dekstremuloj revas nur najli la prezidenton Obama ĉe flamanta kruco. En Hispanio, kie konservativuloj, kiuj neniam rompis siajn incestajn ligilojn kun la katolika hierarkio, de nun volas malpermesi terapian aborton. Ni ne forgesu la malracian histerion okazintan en Germanio pro la juĝo de la Kolonja tribunalo pri cirkumcidado ...

Laika ŝtato ne devige estas demokratia, sed demokratio povas esti nur laika – sekve ateista –, ĉar la leĝo agnoskas nenian dion. Ĉiufoje kiam

ŝtato trovas bonan kialon por cedi al religia kaprico, ĝi malfermas la vojon al krima furiozo. Kaj la civitano, ĉu ateisto, ĉu kredanto, ĉu prifajfanto, proe perdas iom pli el sia karno. Foje laŭ ĉiuj signifoj de la vorto.

Gérard Biard
El *Charlie Hebdo n°1050,*
La 1-an de aŭgusto 2012.
El la franca tradukis Janine Dumoulin

La nomo

Se l' vastan universon
konsistigas vakuo,
neniu miru
ke kristanoj plej saĝe
sian ĉefdion nomas
la eter-nulo.

Jorge Camacho

Respondo al demando de Michel Ahado

Legante la artikolon « Kvar demandoj al la legantoj de ateismo » de Michel Ahado, mi ne tute konsentas kun la unua demando. Mi ne opinias ke malnovaj religiaj monumentoj estas verukoj. Restaŭrado de tiuj monumentoj rilatas al nia kulturo, kaj ne vere ŝokas min la fakto ke la ŝtato (do, parto de la impostoj de ĉiuj civitanoj) restaŭras ilin. Kiel aperus Parizo au Romo sen preĝejoj bone konservataj ? Religio kun siaj konstruaĵoj, ideologio … ja apartenas al nia historio vole-nevole. Ni ne povas forviŝi ĝin. Male, nia rolo, nuntempe, konsistas en malfortigo de la potenco de la eklezio ; en demonstrado de la vaneco de la kredo je Dio … Se ni bone « laboros », iun tagon, sen batalo, nur dank' al racieco, preskaŭ neniu plu frekventos preĝejojn. Mi diras « preskaŭ » ĉar ĉiam ekzistos kredemuloj bedaŭrinde.

Rilate « la demandon en la demando », mi opinias ke Francujo ne estas tute laika :

1) Unue, en la leĝo de 1905, la ŝtato mem fariĝas la posedanto de la bienoj de la eklezio, kaj ebligas al ĝi uzi tiujn bienojn kiel antaŭe. Mi klarigis kial mi povas konsenti pri tio. Male, monhelpi la konstruaĵojn de la novaj preĝejoj, moskeoj … pretekste ke ĉiuj religioj egalrajtas kaj egalvaloras ne estas akcepteble. Se oni vere disigas la ŝtaton de la eklezio, ne plu temas pri la « rajtoj » aŭ la « valoroj » de la religioj. Religio apartenas nur al la privata sfero de la vivo de la civitanoj kaj ne plu koncernas la ŝtaton.
2) Ekzistas religia eduksistemo monhelpata de la ŝtato mem, do grandparte pagata per la impostoj de la civitanoj.


3) La speciala statuso de la provinco de Alzaco kaj Mozelo, kiun oni nomas « konkordato » estas vera danĝero por la cetero de la lando. Kial nun ne denunci tiun kontrakton inter la papo kaj la franca ŝtato, kiu ebligas dungi pastrojn kiel ordinarajn funkciulojn, kiu devigas la instruadon de la religio en la lernejoj kaj aliaj absurdaĵoj tiaj ?

Martine Rivière (Francujo)

La bulteno "Ateismo" tre interesis min. Momente, el George Sand (franca verkistino / 1804-1876), tre ĝustaj vortoj, laŭ mi :

"Ĉiuj monoteismoj supozigas imanentan misiemon. Dum la toleremo karakterizas la politeismon kiu akceptas kunekzisti kun aliaj dioj, la fakto mem kredi je ununura dio implicas la neadon de la plurismo, kaj instigas la adeptojn disvastigi la principon de propra dio-unueco".

Vincent Gerbe (Francujo)



Ateismo

organo de ATEO

Ateista Tutmonda
Esperanto-Organizo

Kovrilo : Pretigita de Fabiano Corsetti surbaze de ŝerco el Interreto

Bonvolu sendi viajn artikolojn al : christian.riviere@laposte.fr

Por informoj : **Anna Löwenstein**,
via del Castello, 00036 Palestrina, Italujo
anna.lowenstein@esperanto.org

Jarkotizo : 10 € por A-landoj
8 € por B-landoj

Konto ***ateo-y*** *ĉe UEA*